

Pola

Esperantisto

Esperantysta Polski

XXXII JARO

NRO 6

JUNIO 1938

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

BONVENONI!

Pasintjare ni kunvenis en rondo de niaj eksterlandaj amikoj, festante oran jubileon de nia ideo. Festaj tagoj forpasis, postlasante al ni devojn kaj taskojn, kies plenumon postulas nia movado. Ili kuŝas en plifortigo de niaj organizaĵoj, en disvastigo de Esperanto inter vastaj rondoj de la socio, en unuigo de niaj penadoj. Al efektivigo de tiuj ĉi celoj gvidas malfacila kaj streĉa vojo, peza senĉesa laboro! Unu el multaj rimedoj estas niaj landaj kongresoj, dum kiuj oni pripenas kaj preparolas la agadmanieron.

Tial P. E. D. vokis VIII Pollandan Kongreson de Esperanto al Kraków kaj invitis ĉiujn bonvolemajn samideanojn partopreni ĝin, kredante, ke la kongreso estos ankoraŭ unu paŝo antaŭen al efektivigo de niaj revoj!

Kraków ĉiujn gasteme akceptos kaj metos al ĉies dispoŝio siajn arangojn!

Kraków Vin kore salutas en siaj muroj!

Kraków Vin ĉiujn bonvenas kaj deziras sukcesan laboron!

VIII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO

KAJ

GENERALA KUNVENO DE P. E. D.

OKAZOS LA 18—19 VI. 1938 EN KRAKÓW.

Adreso: P. E. D., Kraków, ul. Lubicz 34.

Kotizo: zł 3.—, por familianoj, studentoj kaj junularo zł 1.50, por senlaboruloj kaj blinduloj senpage. Konto PKO. Nr 411.404 (Delegacia Esperantystów w Polsce).

Fervojrabato okaze de „Kraĵovaj Tagoj“: 50%. La vojaĝoficejoj (kiel Orbis, Cook ktp.) eldonas senpage t. n. „Karton de la partoprenado en la Kraĵovaj Tagoj“; tiun ĉi karton oni devas nepre stampigi ĉe la elir-

stacio, aĉetante samtempe normalan fervojbiletan al Kraków. Ĉi tie oni alpagas zł 2.50 aŭ zł 4.— (dependas de la distanco) kaj reveturas senpage.

Loĝejoj: komunaj po 80 gr kaj 1.60 zł, privataj po 2.50 — 3.— zł, en hotelo po 3.30 zł. Loĝejojn oni devas mendi rekte ĉe **Polski Związek Turystyczny, Kraków, Lubicz 4**, antaŭpagante samtempe minimume 50% de la loĝejezo.

La Komitato petas sciigi ĝin pri dato kaj horo de la alveno.

Ekzamenoj okazos la 18. VI. 1938.

Programo: Vendredo 17. VI. Akceptado de alveturintoj en la stacidomo.

Sabato 18. VI. 21 h Interkonatiga vespero.
9 h Inaŭguro de la Kongreso kaj Konferenco de PED.

13 h Komuna tagmanĝo.

15 h Laborkunsido.

Ekzamenoj.

19 h Feŝto de la Florkronoj (Wianki).

Dimanĉo 19. VI. 9 h Diservo.
Ekskursoj al Wieliczka aŭ Sowiniec.

Distraĵoj de „Krakovaj Tagoj“.

Rimarkoj: En la tagoj 17—19. VI. 1938. gastigos nia urbo la Nacian Teatron, kiu prezentos la komediojn „Skiz“ de Zapolska kaj „Pan Jowialski“ de Fredro. Ni vidos sur la krakova scenejo jenajn famegajn geartistojn: Solski, Węgrzyn, Zelwerowicz, Cwiklińska, Lindorfówna, Czaplinska, Świerczewska, Wesolowski, Rózycki k. a. Krom tio la programo de „Krakovaj Tagoj“ prezentas multajn amuzajn distraĵojn! Venu do multnombre al Kraków, la Komitato kore invitas Vin.

Prezo de ekskurso al Wieliczka zł 2'30, al Sowiniec zł 1'—.
Organiza Komitato.

ĜENERALA KUNVENO DE P. E. D.

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj grupoj per siaj rajtigitaj reprezentantoj. Ĉiu reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en kiu estu citita nombro de la membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

Tagordo: 1) Raportoj. 2) Raporto de la Rev. Komisiono. 3) Elekto de la Revizia Komisiono. 4) Fikso de la sekvanta Ĝ. K. 5) Demandoj kaj proponoj.

Art. 26. § 1. La Ĝ. K. estas decidopova, se la ĉeestantoj rajtigitaj al voĉdono reprezentas minimume $\frac{1}{4}$ da ĉiuj voĉoj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P. E. D. kune.

§ 2. Se la Ĝ. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la Ĝ. K., dum kiu la decidoj estas alprenotaj sendepende de la nombro de reprezentitaj voĉoj. Tiun ĉi novan Ĝ. K. ne koncentras normoj de art. 21 §§ 1 kaj 1 art. 25 § 3 alineo 1.

Estraro de P. E. D.

AVIZO!

Ni sciigas, ke P. E. D. klopodas pri rabatitaj pasportoj al Londono. La nombro estas limigita; povas ilin ricevi nur la aktive laborantaj gesamideanoj. Administraj kostoj 6 zl.

ELIRO EL MORTPUNKTO.

Krizo, krizo kaj ankoraŭ foje krizo. Krizo en ĉiu medio kaj en ĉiu direkto. Tiu fatala krizo kaŭzis, ke oni forte tenas ĉiun malfacile perlaboritan groŝon kaj antaŭ ol elspezi ion oni ordinare pesas la gajnon kun la perdo. Se la pezo de l'gajno estas pli granda ol la pezo de perdo — tiam oni senhezite elprenas ion el sia monujo, sed se oni ne esperas ion tuj gajni aŭ se oni tute ne vidas en perspektivo personan gajnon, tiam oni tre nevolonte ion elpoŝigas. Jen estas kaŭzo pro kiu preskaŭ ĉiuj esperantaj grupoj en Polujo lamas kaj konsekvence lamas ankaŭ en Polujo tuta esp. movado kune kun sia centro PED en Kraków.

Feliĉe tamen heliĝas en horizonto. Niajn korojn plenigas espero, ke patologia stato de la Esp. movado en Polujo baldaŭ forpasis kaj kroniĝos per daŭra, laŭplana agado, direktota de PED en Kraków.

Oni trovis tute realan formon de eliro el la ĝisnuna tiurilata mortpunkto, nome oni decidis fari libervolan unufojan monoferon

por fondi kapitalon de 5.000 zl (kvin-mil) kaj tiamaniere dece funkciigi sekretariojn de PED, kiu devas kaj iĝos VERA CENTRO de Esp. movado en Polujo. Monkolekto de libervolaj oferoj jam estas komencita kaj projektita plano realiĝas.

La unua koncernanta tiun ĉi temon artikolo, aperinta en nro 8—9/1937 de PE sub titolo „Sufiĉe da pasiveco“ jam kaŭzis tute klaran eĥon, kies postginojn ni konstatas en numeroj 2, 3, 4, 5 de PE el 1938.

Nun denove ni havas plezuron kvitanci kelkajn samideanojn, bedaŭrinde nur, ke Warszawa, Białystok, Bydgoszcz kaj Wilno tute ne resonas.

NI LAŬTE VOKAS AL VI, GESAMIDEANOJ: jetu sur la pesilon kelkan sumon. VEKIĜU KAJ FARU, KION VI, KIEL PLENKONSCIA ESPERANTISTO DEVAS FARI.

Mgr Czesław Pruski
Lublin.

„KVINMIL — FONDO“.

Pluaj pagoj por la „Kvinmil—Fondo“:	S. Nudel, Lublin 1'— zl
Esp. Sekcio ĉe „Kultur-Liga“, Lublin 2'— zl	A. Sanik, Lublin 1'— „
Bohdan Drzewiecki, Lublin 2'— „	Ado Zorkraut, Lublin 1'— „
F-ino M. Z-ska, Lublin 2'— „	

**ĈU VI VIDIS EKZEMPLERON DE
SCIENCA GAZETO
aŭ
NOVA BULTENO?**

Se ne, petu ilin tuj senpage, poŝtkarto sufiĉas!

Adresu:

**American Esperanto Institute Rockford,
Illinois, Usono.**

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABO-
NANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA
ABONON POR J. 1937, PAGI LA ŜLDON
JE NIA KONTO PKO Nr 406.660.**

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika
„Pola Esperantisto“ uskutecznić można na
konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem
rozrachunkowym, kartoteka Nr 29,**
co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

OFICIALAJ SCIIGOJ DE LA AKADEMIO.

DIFINOJ DE VORTELEMENTOJ

(Publika propono)

1-a Listo.

(Daŭrigo)

- | | |
|--------------------|---|
| 41. ador' (v tr) | = 1. respekti kaj honori kiel dion;
2. amegi. |
| 42. adres' (s) | = 1. preciza loĝloko de persono, difinita per strato, urbo ktp.;
2. surskribo sur koverto aŭ pakajo, montranta la nomon kaj la precizan loĝlokon de la persono, al kiu ĝi estas sendata. |
| 43. adstring' (a) | = havanta la eon kuntiri la histojn, kiujn ĝi tuŝas. |
| 44. adult' (v ntr) | = rompi la geedzan fidelecon. |
| 45. adverb' (s) | = vorto, aldonata al nesubstantivo por precizigi ĝian signifon laŭ loko, tempo, kvanto, maniero ktp. |
| 46. advokat' (s) | = 1. juristo, rajtigita por pledi en juĝejo por la interesoj de procesanto aŭ de akuzito;
2. iu, kiu subtenas por vortoj aferon, opinion, projekton k. s. |
| 47. aer' (s) | = miksaĵo de gasoj, plejparte azoto kaj oksigeno, kiu ĉirkaŭas la teron. |
| 48. aeroplan' (s) | = aparato, pli peza ol la aero, sed kapabla leviĝi kaj moviĝi en ĝi. |
| 49. afabl' (a) | = 1. kondukanta amike, kun agrablaj vortoj kaj komplezo;
2. esprimanta amikecon, ĝentilecon, komplezon. |
| 50. afekt' (v tr) | = ŝajnigi ion per nenaturaj manieroj. |
| 51. afer' (s) | = 1. ĉio, kio estas en la mondo, konkreta aŭ abstrakta, montrata en nedifinita maniero;
2. io, kio estas objekto de pensado, laborado aŭ okupado. |
| 52. aflikt' (v tr) | = malĝojigi, suferigi morale. |
| 53. aforism' (s) | = konciza, sencoriĉa principo aŭ penso, rilata al scienco aŭ arto. |
| 54. Afrik' (s) | = mondparto, troviĝanta sude de Eŭropo, inter la Atlantika kaj Hinda oceanoj. |
| 55. ag' (v ntr) | = 1. uzi siajn fizikajn aŭ spiritajn fortojn por produkti iun efikon;
2. uzi rimedojn por atingi celon. |
| 56. agac' (s) | = malagrabla sento en la dentoj, kaŭzata de fortaj acidoj. |
| 57. agat' (s) | = speco de kvarco kun diverskoloraj vejnoj. |
| 58. agit' (v tr) | = 1. malkvietigi, inciti homojn por politikaj celoj;
2. naski en la animo sentoj, kiuj ĝin maltrankviligas. |

59. agl' (s) = rabobirdo el la familio de falkoidoj (Aquila).
60. agoni' (v tr) = dolora lasta batalo de mortanto kontraŭ la morto.
61. agord' (v tr) = 1. starigi ĝustan rilaton inter la diversaj sonoj de unu aŭ pluraj muzikiloj.
2. inklিনিги iun al iu agmaniero, emigi iun al io.
62. agrabl' (a) = kio plaĉas, plezurigas.
63. agronomi' (s) = scienco, arto kulturi la teron.
64. ag' (s) = tempo, dum kiu vivis homo aŭ besto aŭ dum kiu ekzistis objekto.
65. agi' (s) = diferenco inter la nominala kaj la efektiva valoroj de la mono.
66. ajl' (s) = vegetaĵo el la familio de liliacoj, uzata kiel spicaĵo (Allium sativum).
67. ajn (n) = vorto, aldonata al pronomoj, adverboj kaj konjunkcioj por insisti pri la nedefiniteco.
68. -aj' (s) = 1. sufikso, esprimanta konkretan, materian objekton, karakterizatan de la radiko;
2. sufikso esprimanta le eksteran montriĝon de sento.
69. akademi' (s) = 1. supera lernejo, universitato;
2. oficiala societo de sciencistoj, literaturistoj aŭ artistoj.
70. akapar' (v tr) = 1. aĉeti kiel eble plej grandan kvanton de iu komercaĵo por plialtigi ĝian prezon;
2. propriĝi al si, kaŭzante malutilon al aliaj.
71. akar' (s) = parazita besto el la klaso de araknoidoj (Acarus).
72. akcel' (v tr) = plirapidigi kaj samtempe helpi, sukcesigi.
73. akcent' (s) = plilaŭtigo, plifortigo de la voĉo sur unu silabo de vorto aŭ sur parto de frazo;
2. aparta parolmaniero, kiu distingas fremdulon aŭ loĝanton de speciala regiono;
3. insisto pri la aparta graveco de certa punkto.
74. akcept' (v tr) = 1. konsente ricevi ion, kio oni donas aŭ proponas;
2. lasi vizitantojn eniri en la domon;
3. aprobi, konsenti pri;
4. alpreni, ricevi.
75. akcesor' (a) = neĉefa, flanka.
76. akcident' (s) = malfeliĉa, neatendita okazaĵo.
77. akcipitr' (s) = rahobirdo el la familio de falkoidoj (Astur palumbarius).
78. akir' (v tr) = havigi al si per laboro, penado.
79. aklam' (v tr) = saluti, akcepti, aprobi per favoraj krioj.
80. akn' (s) = patologia ŝvelaĵo de la haŭto.
81. akompan' (v tr) = 1. iri kun iu aŭ io;
2. kunludi per muzikilo kun iu.
82. akord' (s) = 1. samtempa harmonia sonado de kelke da sonoj;
2. harmonio, rezultanta el komunaj opinioj;
3. ĝusta konveneco inter aferoj.
83. akrobat' (s) = cirka gimnastika artisto.
84. akr' (a) = 1. havanta maldikan tranĉan randon;
2. havanta pikan pinton;
3. kiu forte ekscitas la sentojn;
4. severa, malmilda.
85. akrid' (s) = insekto el la subklaso de ortopteroj, detruanta la grenojn (Acridium, Pachytylus).
86. aks' (s) = 1. rekta linio, ĉirkaŭ kiu, efektive aŭ image, turniĝas korpo;
2. cilindroforma stango, ĉirkaŭ kiu turniĝas rado aŭ maŝinparto;
3. centra linio, ĉirkaŭ kiu pli aŭ malpli simetrie grupiĝas sistemo.
87. aksel' (s) = kavaĵo sub la artikolo de la ŝultro kaj brako.
88. akt' (s) = 1. parto de dramo aŭ komedio, enhavanta kelke da scenoj;
2. oficiala dokumento, atestanta fakton.
89. aktiv' (a) = 1. kiu produktas, laboras, agas;
2. kiu gramatike esprimas agon;
3. kiu prezentas la pozitivan parton de proprajo.
90. aktor' (s) = artisto, ludanta rolon en teatraĵo.
91. akus' (v ntr) = liberigi de matura fetoto el la utero.

92. akuzativ' (s) = kazo de la deklinacio en diversaj lingvoj, kiu esprimas la rektan komplementon de verbo aŭ la celon de movo.
93. akv' (s) = hemia kombinaĵo de hidrogeno kaj oksigeno (H₂O), fluidaĵo, kiu formas la marojn, lagojn kaj riverojn.
94. al (n) = 1. prepozicio, montranta direkton kaj celon de movo;
2. prepozicio, uzata por esprimi la dativon, montrante la destinion de ago;
3. prefikso, esprimanta direkton de movo aŭ destinion de ago.
95. alaŭd' (s) = kantobirdo el la familio de koniistroj (Alauda).
96. alcion' (s) = birdo el la familio de halcionidoj (Alcedo).
97. ali' (a) = 1. diferenca, malsama, ne egala;
2. dua el du personoj aŭ grupoj.
98. alk' (s) = speco de norda cervo kun larĝaj, plataj kornoj (Cervus alces).
99. almenaŭ (n) = 1. ne malpli ol;
2. eble aliaj, sed ne.
100. almoz' (s) = mondonaco al malriĉulo, kiu petas por tio.

DOROTA STEIN

muzikprofesorino.

Kelkaj vortoj pri publika koncertado el notoj.

Sufiĉe ofte ni atentigas pri unuflankeco de koncertaj programoj, pri konstanta apearado en ili de ĉiam la samaj komponoj ĉe samtempa malzorgemo de aliaj valoraj muzikaĵoj, kaj ni ne komprenas la kaŭzon de ĉi tiu simptomo. Tamen la solvo de tiu enigmo ne estas tiel malfacila. La artistoj-ludantoj havas nek tempon, nek eblon alproprigi al sia memorkapablo centmilojn da muzikverkoj, tial ili elektas certan nombron da graciaj, teknike facilaj, ĉiam sukcescertaj komponaĵoj, el kiuj ili aranĝas siajn repertuarojn, postlasante la reston, kiel oferdonacon por dioj.

Ĉu ne estus ĝuste oferi iom da atento al tiu tute formala flanko de okazantaj koncertoj? Ĉar la parkera ellerno de muzikaj komponaĵoj metas limojn al repertuaroj de artistoj, tial grandegaj terenoj de la muzika literaturo restas neuzitaj kaj depost jaroj atendas la bonfarantan manon, kiu ilin al la vivo redonus....

Neelĉerpeblaj trezoroj de la beleco estas fermitaj en misteraj muziknotoj, sed neniu penas atingi la oran ŝlosilon, kiu malfermus la pordon al ili, donante samtempe enrigardon en sorĉan landon de vera beleco. Kiu aŭdas nun ie pianajn sonatojn de Haydn, Mozart, Weber, Schubert, Beethoven (krom Apassionata)? Cu iu ludas, krom „Fantazio C-Dur, simfoniaj etudoj kaj Karnavalo, verkojn de Schumann?

Vere neniam ni aŭdas tutan vicon da grandiozaj komponaĵoj de tiu komponisto, same kiel malgajan sorton de forgesemo trovis plej granda parto de komponaĵoj de Mendelssohn; ofte ni aŭdas verkojn de Chopin, sed prefere ĉiam la samajn etudojn, prelu-

dojn, nokturnojn, mazurkojn, polonezojn, kaj la resto de liaj verkoj preskaŭ neniam eksonas en koncertaj salonegoj; ne dirante jam pri komponaĵoj de Bach, Brahms, Liszt, kiuj fariĝis oferdonoj de malsaĝa ambicio de artistoj, malpermesanta al ili eniri la koncertstradon kun notoj. Ne nur al tiuj komponaĵoj unuflanke sed same al la aŭskultantoj maljustaĵo okazas, ekzistas ankoraŭ pluaj oferoj de tiu dogmo, de parkera ludado. Nome estas multe da tre kapablaj, diligentaj kaj perfektaj muzikistoj, kies parkera malcerteco estas ĉefa malhelpo sur vojo al plena evolvo de ilia talento kaj kiuj devas rezigni pri muzika agado pli grandskala nur pro tio, ĉar ili ne povas multe parkere ellerni kaj elstudi.

Ĉu ne valorus rompi la dogmon de parkera ludado kaj restigi la liberan elekton al la artisto? Ĉu la reveno al tempoj, kiam oni prefere el notoj ludis, estus ruino de artista nivelo? En la tempoj de Mozart oni ludis prefere el notoj; la lernantoj de Chopin (Mikuli) ludis ĉiam el notoj. Ĝis kiam en tempoj de Thalberg kaj Liszt disvastiĝis la kutimo de publika parkera koncertado. Ĉu la virtuozita traktado de muziko kiel kampo por publika ekzameno ne estas spirita ruino rilate al kreinto kaj lia verko? La artisto estas interhelpanto inter komponisto kaj publiko kaj lia tasko estas prezentado al la aŭskultantoj de lia verko en plej perfekta interpretado, servanta al intencoj de kreinto.

Tio estas la misio de komponado. Kun penso al ĝi povas la artisto kuraĝiĝi ludi la malpli konatajn kaj pli malofte ludatajn, sed vere profundajn kaj belajn komponaĵojn

el notoj... kaŭze de ilia parkera efektivigado, kaj tio absolute ne devas malgrandigi liajn valorojn, kiel de artisto; kontraŭe, oni devus substreki tion kiel specialan meriton por disvolvo kaj disvastiĝo de multaj, for-

gesataj kaj ne konataj majstraj verkoj de muzika literaturo.

Esperantigis el pola lingvo
N. Bertig-Dattnerowa

MIA VIZITO EN RUMANUJO.

Bucuresti, 11 majo.

Partopreninte la 50-jaran jubileon de la Instituto Victor Babes, fama sciencisto, kiu estis unu el la unuaj pioniroj de mikrobiologio, mi ne povis preterpasi la Rumanan Samideanaron. La merita longjara Prezidanto de la Rumana Asocio estas ja longe de ni konata fervora samideano H. Fischer, jam ora jubileulo. Mi konatiĝis kun li jam dum la oka krakova kongreso, kiam estis inter ni ankoraŭ nia kara Majstro kaj amata mia kolego. Nun s-ro Fischer vizitis min dum unu el sciencaj kunsidoj en la Instituto Babes. Li rakontis pri diversaj malfacilaĵoj lastatempaj en la movado. Ili fine ĉesis kaj nun la Bukaresta Societo fervore laboras.

Mi ĉeestis la kunsidon, kiun partoprenis multaj, kvankam ne ĉiuj anoj, ĉar mi ne povis tute certe promesi mian viziton, Mi salutis la anaron je la nomo de Pola Samide-

anaro kaj PED kaj rakontis pri kelkaj detaloj de nia vivado.

Mi petis doni al mi la liston de samideano kaj jen mi ĝin prezentas:

S-ro H. Fischer Prezidanto. H. Harabagiu ĝen. sekretario. F-ino Salomonovici Gusta sekretariino. Jozef D. Heim ĉefkasisto. Saul Osias. Jos. Schechter. F-ino Irene Petak. Tony Ornstein. Giselle Harabagiu. Tina Bendel. S. Zalmanovici. S. Oroviceanu. S. Nuhamovici Inĝ. Plotkin. Georgo Dulan. Joan Dumitrescu. Joan Stoice. Tri lastaj fervore por Esp. laborantaj blinduloj.

F-ino Gusta Salomonovici*) bonvolis kolekti la liston kaj alporti al mi antaŭ mia forveturo el Bucuresti.

Belega urbo, helega kaj agrablega lando Rumanujo — karaj Gesamideanoj — ĝis revido!

O. Bujwid

*) Licenciata de filozofia fakultato je filozofio kaj literaturo.

HENRIKO GIELB

ESPERANTO - FELIETONO EL FRANCUJO.

Kvazaŭ speciale: la germanaj vagonaroj, kiuj funkcias ĉiam kun absoluta precizeco, tiun fojon ne sukcesis, ĉe la germano-belga limostacio, anstataŭ 20 minutoj, ni staris pli ol 2 horojn. Oni diris, ke estis trovita valuto-kontrabando. Mi vere rimarkias, ke policistoj elvagonigis 3 personojn, kiuj ne revenis. Sed mi estis malpacienca pro alia kaŭzo: por la kvara horo de la sama dimanĉo mi estis fiksinta rendevuon kun parizaj samideanoj ĉe la Norda stacidomo en Parizo. Ĉu ili atendos? Ja estas Parizo! kaj kiam oni venas la unuan fojon en tiun homan formikejon!

Ili rakontis al mi poste, ke estis amuze, kiam oni ĉiufoje anoncadis, ke la „vagonaro el Berlino malfruiĝos je... 15 min., 30 min., 1 horon... kaj fine ĝi venis je la 18 30 anstataŭ je la 16. Ili tamen atendis. Vere servemaj samideanoj. Jen S-ano Canal kun edzino, f-ino Claude k. a.

Feliĉe — ĉar la parizaj portistoj parolas... france, sed oni devas longtempe esti en Parizo por kompreni ilin. La aliregionanoj diras, ke la „popolo“ en Parizo ne parolas

bonan lingvon. Rilate la lingvon estas vere iom malfacile: la franca lingvo ne estas tre malfacila, PRECIPE POR ESPERANTISTOJ, sed kiam oni ne estas alkutimigita al ĝia sono, oni ne povas kompreni eĉ unu vorton! Nur post iu tempo oni komencas diferencigi vorton de vorto. La franca lingvo estas parolata ĉefe per la lipoj. La diversaj nuancoj de prononcado, kiuj difinas la signifon de la esprimo, estas akiritaj dank'al la mirinde flekseblaj lipoj de la francoj. Mi devis serĉi pli profundajn kaŭzojn, ol nur filologiajn, de tiu lipofleksebleco kaj mi eĉ konstruis teorion de tiu majstreco...

Ĉefe en Parizo, — kie vi turniĝas, kien vi venas, ĉu en „Metro“, ĉu en tramo, aŭ ĉu vi vagas tra la Bulvaroj, aŭ fine se vi grimpas al la Sacré-Coeur — ĉie vi renkontas kisigantajn parojn. Senmove ili staras dum longaj minutoj kap-al-kape kaj kisas; kisas dum plentago, dum vespero kaj dum nokto. Oni estas alkutimigita, neniu eĉ jetas rigardon al kisiganta paro en plena suno...

Kiam post kelkaj semajnoj, mia franca amikino ekzercis kun mi la prononcadon

de la malfacilaj vortoj, montrante kiamaniere oni devas „ludi“ — jes, ludi per la lipoj — nur tiam mi reekmemoris pri la kisigantaj paroj, kaj kiel la fama greko Arhimedes, mi ekkriis: „Eŭreka“! Mi trovis la kaŭzon de la majstra lipofleksebleco... Mia amikino, kiam mi klarigis mian „teorion“, ŝi komence ridetis, sed post ioma priprenso ŝi diris: si, si, c'est possible..

Iun verperon mi iris en Parizo al la 34, rue Chabrol. Kun ĝojo mi konstatis, ke oni parolas nur Esperanton. Estis kluba vespero, ĉeestis ĉirkaŭ kvardeko da gesamideanoj. S-ro Petit, per ĉerco-amuza maniero gvidis la kunvenon, dum kiu oni paroladis, legis, kantis kaj eĉ dancis. La francaj s-anoj montris grandan intereson por la Esp.-movado en Germanujo, pri kiu ili petis min rakonti. La vesperon ĉeestis krome kelkaj eksterlandaj samideanoj. Estis ja la epoko de la neforgesebla „Expo 1937“. Hodiaŭ la Ekspozicio estas mortinta, sed en oktobro ĝi estis en sia plena sezono. Ĝuste la lastaj pavilonoj estis finkonstruitaj, kiam mi ĝin vizitis. Ĝi estis do la kulmina punkto de tiu noimagebla spektaklo. Mi pasigis en la ekspozicio plenajn 8 tagojn kaj vesperojn kaj ĉiufoje mi elkovradis ion pli ĉarman. Mia bonega „Velti“, nova memoraĵo el Düsseldorf, funkciis senĉese, eternigante la mirindaĵojn de la „miraklo 1937“ sur longaj filmo-rubandoj, kiuj por ĉiam memorigas al mi tiujn fabelajn tagojn.

Kaj Parizo mem?

Venu, kara leganto, al Parizo, trakuru en aŭtomobilo (sed konsciplene kaj majstre gvidita, tiel kiel s-ano Canal kondukis la sian, montrante al mi Parizon kaj la ĉirkaŭaĵojn) tiun ĉefurbon de la mondo, vidu kiel la majesta Notre-Dame, en milkoloraj lumoj de jupiteroj, digne prenas sian vesperan banon en la trankvila Seine, vidu la „Champs-Elisées“, la Opéra, la Concorde — la Concorde, tiun plej ĉarman placon de la mondo, kaj provu sin reteni por ne ekkrii kun ekstazo: oh, jes, jes... ça c'est Paris..

Kaj se mediti iom volas vi, se la paĝojn de la historio, kiun vi lernis iam, travivi deziras vi, se fine volas vi senti la atmosferon de Grandaj Tagoj de la franca historio, ilin vidi propraokule, sin retiriĝi al antaŭa jarcento, senti la ĉeeston de la Spirito de la Granda Napoleono, — tuj venu Parizon kaj kuru al Saint-Germain, al Versailles kaj al Fontainebleau... Tie vivas la historio. La portretoj, pentraĵoj, gobelenoj, diversaj objektoj — jes, ili rakontas la Grandan Historion de la Franca Popolo.. Neniame mi forgesos tiujn emocioplenajn tagojn travivitajn dum la unuaj semajnoj de mia restado en Francujo.

Jes, en FRANCUJO, ne nur en Parizo. Nancy, la ĉefurbo de Lorraine, la urbo de mia konstanta adreso, estas kvazaŭ malgranda Parizo. Verdire ĝi estas proksimume 40-oble malpli granda ol Parizo, sed ĝi ne estas proporcie tiom-oble malpli ĉarma. Tute ne! Ofte mi faras promenadon tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, admirante belajn parkojn, placojn, preĝejojn kaj arbarojn. En la unuaj tagoj en Nancy mi konatiĝis kun la doktorigantoj de la jura Fakultato. Kelkaj el ili estas eksterlandanoj, loĝantaj en tiu urbo depost 1 aŭ 2 jaroj. Ili rakontis al mi pri la Nancyanoj, ke ili estas „fermitaj homoj“, kiuj precipe evitas eksterlandanojn kaj en sian domon neniam ili invitas fremdulon, eĉ sian bonan amikon. La plendoj pri la fermiteco kaj malvarmeco de la Nancyanoj, en la buŝoj de miaj kunstudantoj estis teruraj. Kelkaj konfesis, ke malgraŭ 2-jara restado en tiu urbo, ili konas neniun francan familion. Jen kutimo mi pensis!

Rapide tamen mi konvinkiĝis, ke ĉio estas relativa...

Verdire mi estus devinta komenci la parton pri Nancy de la Esperantistoj ĉi tie, ĉar la hejmeca atmosfero, kiun mi sentas kaj la „dementi“ kontraŭ la asertoj de miaj kamaradoj, kiun mi povas nun fari, mi devas danki al ili.

Dank' al Esperanto mi konatiĝas kun multaj francaj familioj kaj iliaj hejmoj, dank' al Esperanto mi gajnis multajn vere bonajn kaj simpatiajn geamikojn inter la doktorigantoj, francoj kaj dank' al Esperanto mi ne sentas, ke mi estas „fremdulo“ (étranger), tiun malagrablan senton, kiun ĝenerale sentas ĉiu fremdlandano en Francujo. Mi tute ne sentas, ke mi estas en fremda lando, kontraŭe, — se mia tempo permesus tion, mi devus ĉiutage fari almenaŭ unu viziton al franca familio, en ĝia hejmo, por kontentigi la gastemajn invitojn, ĉiufoje oni demandas min: kaj kiam fine vi havos tempon, sinjoro, por veni iom ankaŭ al ni?

Sed al mi vere mankas tempo: mi ja ne povis ankaŭ rifuzi gvidadon de 2 esperantokursoj, organizitaj de la urbo.

Ĝuste interesa afero: jen antaŭ du tagoj mi ricevis leteron de la urbestro. Oni petas min prezenti la kursanojn, kiuj meritas la gradon „tre bone“. Ili estos metitaj en la vicon de la „Palmarés“ kun aliaj „trebonanoj“ de aliaj, ne esperantaj kursoj kaj ili ricevos premiojn...

El ambaŭ kursoj mi elektis 15 personojn, kiuj meritas „trés bien“. Tiel do, 15 el miaj gekursanoj ricevos de la urbestro premiojn pro bona studado de Esperanto. Mi persone estas tre dankema al la Maire de Nancy, la Estiminda D-ro Schmitt (membro cetere

de la patronado de la Esperanta Grupo de Nancy), ĉar la „palmarés“ vekis en multaj kursanoj novan fervoron al lernado: ĉiu el ili volus meriti „tre bone“. Vere taŭga instigilo al lernemo. Verdire oni laboris ankaŭ sen tio: la supera kurso ekzemple, nevole kaj nepolitike okupiĝis eĉ pri politiko. Dum kelkaj lecionoj oni diskutis la temon de politika propagando per Esperanto: oni faris referaĵojn pri diversaj politikaj eldonadoj en Esperanto: Popola Fronto en Hispanujo, „Hurlu Cinujo“, japanaj politikaj eldonadoj ktp. Krome, inter la gekursanoj oni sentas jam „kongresna“ atmosferon: proksimiĝas la Franca Nacia Kongreso kaj kelkaj prepariĝas por la 30 Un. Kongreso: ofta temo estas „ni iras al Londono“.

Rilate la urboprezidanten de Nancy, li montriĝis bonega mastrumanto de la urbo: ne ekzistas branĉo de la urbomastrumado, kiun li estus forgesinta: Antaŭ kelkaj tagoj okazis en Nancy karnavalo-fino, ĝi estis io vere mirinda.

La stratoj de la urbo estis plene ŝtopitaj de homoj, venintaj el la tuta ĉirkaŭaĵo. Dekmiloj da homoj, multaj en specialaj kostumoj kaj maskoj, batalis en la stratoj por... confetti... Dume, sennombraj laŭparoliloj disaŭdigis ĉarmajn muzikaĵojn, la junularo, precipe la studentoj, ĝojege amuziĝis, formante Monôme (monôme: longaj vicoj da ĝejnuloj), kiuj „kaptadis“ belajn knabinojn, kaj tiom longe ronddancadis ĉirkaŭ ĉiu, vokante: „embrassez, embrassez“ (kisu, kisu), ĝis ŝi elacetiĝis per kelkaj kisoj.

Kaj samtempe la stratojn trakaradis gi-

gantaj kaleŝoj, jungitaj per po 10 -- 20 ĉevaloj... antaŭ kiuj marŝadis sennombraj orkestroj, konsistantaj el ciklopaj masko-figuroj plej diversaj...

Vojaĝadis Lia Moŝto, Reĝo Karnavalo la 11 kun sia mirinda kortegano. Ĉin kaleŝo prezentis ian komercaĵon aŭ industriaĵon de Lorraine... Jen taŭga propagandilo por la produktoj de Nancy kaj la provinco...

Vespere, ĉe la urhodoma placo okazis iom stranga ceremonio: oni laŭtleĝis akuzon kontraŭ la Reĝo Karnavalo, kaj la multmila publiko, per krioj „kondamnis“ la akuziton je morto... Ekludis orkestroj, estis pretigita gilotino, giganta homfiguro estis pendigita kaj baldaŭ, la placo estis hele lumigita per flamoj de la bruligita Karnavalo... Simbola restaĵo de antikvaj tempoj, bazita sur legendo, laŭ kiu: la Karnavalo, eksciinte, ke oni lin kondamnis, impertinentis kaj minacis al la juĝistoj, ke li provokos pluvegon, kiu malsekigos la tutan popolon... Tiam la tribunalo indigniĝis kaj decidis: se vi provokos pluvon, tiam ni vin bruligos kaj apud via brulanta korpo kolektiĝos la popolo kaj sekigos sinjn vestojn... Malnovajn tempojn memorigas tiu legendo. En Francujo oni trovas ofte ekzercatajn kutimojn, kiuj datiĝas de la plej primitivaj epokoj. Sur la insulo Corse ekzemple, oni renkontas kutimojn de la preskaŭ sovaĝa epoko. Cetera la Corse, la „insulo de beleco“ — kiel ĝin nomas la francoj, onidire estas unu el la plej ĉarmaj landoj de la mondo; — sed tien mi iros post mallonge, kaj ĉion vidindan mi prezentos en sekvonta artikolo.

BIBLIOGRAFIO.

La Muusses Esperanto Biblioteko (Purmerend, Nederlando) eldonis novajn librojn de sia dua serio:

ROZINJO de Gyula Török (el la hungara trad. K. Kaloscaj) kaj

EL LA LONDONA SKIZLIBRO de Charles Dickens (el la angla trad. Fred. Wadham). Prezo de ĉiu libreto f —.35.

LA TUTA ESPERANTO de Henrik Sepik; gramatiko por progresintoj, gvidilo por kursestroj. Eld.: Literatura Mondo, Budapest.

LA TURO PRI HONORO AL FLANDRAJ HEROOJ EN DIKSUIDE - eld. la Sekretariejo pri Izerpilgrimado, Diksmuide (Belg.).

DION ADORI de B. F. Maria Ha de Veruyj, dua eld. Originala poemaro; eldonis Lit. Mondo, Budapest. Prezo: —.40 USA - dolaroj + 10% sendkost.

ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO por Praktika Komenco Kurso de

Delfi Dalman, L. K. Nova eldono plibonigita laŭ internacia kritiko kaj recenzo. Eldono de la aŭtoro - Barcelona 1938.

Prospekto VIZITU ĈEĤOSLOVAKION! Ĉeĥoslovaka Esperantistaro Vin atendas.

LA TEMPO - MAŜINO kaj LA LANDO DE LA BLINDULOJ - de H. G. Wells, du romanoj en nnu volumo, tradukitaj el la angla lingvo de E. W. Amos. N-ro 4 de la „EPOKO“ Libro-Klubo. 192 paĝoj. Prezo por membroj de la Libro-Klubo estas unu angla ŝilingo plus afranko; por ne-membroj: du ŝilingoj plus afranko.

Oni povas aliĝi al la Klubo, aŭ aĉeti apartajn numerojn, ĉe preskaŭ ĉiu Esperantista Librovendisto, aŭ ĉe la Libroservo de Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo. Eldonita de: **The Esperanto Publishing Company, Ltd., Anglujo.**

Ni ricevis la libron de **J. Lazauskas: TARPTAUTINE KALBA**; Kaunas 1937. Bedaŭrinde ĝi alvenis en lasta momento de finpretigo de la n-ro kaj neniu el niaj redakciaj kunlaborantoj scias la litovan lingvon. Sed laŭ la ilustraĵoj kaj aliaj bone konataj datoj kaj nomoj mi opinias la libreton historio de Esperanto. La lasta ĉapitro „Priedas“ enhavas gramatikon kaj 16 regulojn de E. Fine ni trovas 2 strofojn de „La Espero“ tradukitajn en litovan lingvon, versajon „Solvita Demando“ de A. Jakšto - Dambrausko en Esp. kaj litovaj lingvoj kaj la Litovan Nacion Himnon en Esperanto.

Ni ricevis ankaŭ elтираĵojn de **Litova Stelo**, kun artikolo pri Jubileo de Prof. Bujwid.

Samtempe per la amerika poŝto mi ricevis polan versajon s. t. „Bujwidowi na 80-te urodziny“ de Kazis Vidikauskas, aperigitan en la plej granda kaj plej influa, semajna, pola gazeto en Usono — „Gwiazda Polarna“.

Ni tre ĝojas pro la komenciĝanta kunlaboro kun niaj litovaj samideanoj.

L. K.

Aperis **JARLIBRO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-LIGO POR JARO 1938**. Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

La libro enhavas sur 350 paĝoj multajn tre valorajn informojn pri nia movado kaj ĝi devas troviĝi en manoj de ĉiu serioza Esperantisto, Korespondante, propagandante, vojaĝante aŭ instruante oni ĉiam bezonos la libron, kiu servus kiel certa kondukanto tra E.-problemoj. Nur unu bedaŭrinda penso aperas, kiam oni foliumas la libron, ĝi estas la penso pri la malkonkordo en nia movado, kiu evidente kaj danĝere suferas pro tiu duonigo de la fortoj. Ĉefuloj de la mo-

vado interkompreniĝu, ĉar la popolo esperantista volas vivi en paco kaj unuigi la fortojn!

STENOGRAFAJ GAMOJ de A. — G. Provoŝt, Ĝenerala Sekretario de Stenograf Instituto Tutmonda.

Stenografistoj mankas en la Esperantistaro, sed mankis ankaŭ taŭga libro, ebliganta al stenograf-lernantoj ekzerciĝi kaj trafi sufiĉan rapidecon. Pro tio la ĝenerala sekretario de SIT kompilis kaj dekalkulis multajn tekstojn.

La kadencoj de la ekzercoj publikigitaj en tiu unua volumo iras de 60 ĝis 200 silaboj ĉiuminute. Kompreneble tio tute ne sufiĉos por akiri grandan rapidecon, sed estas necese komenci, kaj cetere tiuj ekzercoj kondukos al flua uzado de la rapida skribo.

Tiu verko, vera antologio de Esperanto, estus uzebla de ĉiuj, kiu ajn estas la stenografista sistemo uzata. Ĝi ebligas ankaŭ ekzerciĝi por daktilo, sammaniere kiel por steno, kaj, pro tio, ĝi estos multvalora ekzercaro por ĉiuj, kiuj volas plilertiĝi en unu aŭ alia skribmaniero.

Same, ĉar tiu verko konsistas el multaj mallongaj tekstoj rilatantaj pri tre malsamaj temoj, ĝi ankaŭ estos ŝatinda legolibro por ĉiuj komencantaj esperantistoj.

Jen multaj kvalitoj, kiuj instigos niajn legantojn ĝin aĉeti kaj rekomendi al ĉiuj, kiuj volos akiri ian lertecon aŭ pri steno, aŭ pri daktilo, aŭ nur pri Esperanto.

La prezo de tiu libro estas afrankite: 9 fr. frankoj. Mendu ĝin al Stenograf Instituto Tutmonda, 9 Boul. Voltaire, Issy — Les Moulineaux, Seine, Francujo.

R A D I O.

PROGRAMO DUM JUNIO

La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.

PRI ĈIUSEMAJNAJ DISSENDOJ LEGU EN N-O 5. DE POLA ESPERANTISTO.

ALIAJ DISSENDOJ.

11. 16.00—16.30 Hilversum (301 m): Baritono Jan Blok kantas en Esp. kantojn de Fr. Schubert, Tosti, Strauss, Lortzing kaj Casteldon.
- 17.10—17.25 Hilversum (1875 m) Jarsveld (415 m): Esp.-komunikoj de P. Heilker.
12. 15.00—15.20 Wallonsia (201 m): E. kroniko.

- 22.45—23.30 Paris (431 m): „La ŝipego Tenacity“, 2-a parto.
15. 21.30—21.45 Bulgaraj stacioj (20, 214, 235, 352 m) Esp.-kvaronhoro.
16. 21.30—22.00 Tallinn (229 m), Turi (410 m), Tartu (579 m) E. duonhoro.
18. 23.00—23.10 Lubljana (569 m): Pri IKUE-Kongreso.
19. 22.40—23.10 Hilversum (1875 m), Jarsveld (415 m): Prelego.
20. 22.45—23.30 Paris (431 m): Tri unuaktaĵoj: „Rozalio“, „Nokta ekspedicio“, „Prof. Forgesulo“.
22. 20.13—20.20 Lyon (463 m): Esp.-kroniko.

25. 16.10--16.25 Hilversum (301 m): „Estigo kaj evoluo de N. V. V.“ (A. Veen). 17.00—17.10 Hilversum (1875 m), Jaarsveld (415 m): Esp.-komunikoj de P. Heilker.
26. 15.00—15.25 Vallonia (201 m): Esp.-kroniko.
27. 22.45—23.30 Paris (431 m): „Sa)ome).

Moravska Ostrava

dum junio kaj julio ne dissendos Esperantoparoladojn. Ili estos rekombencataj en aŭgusto aŭ septembro.

La juniaj dissendoj el Paris PTT.

Dum junio okazos la jenaj Esperanto-dissendoj el Paris PTT (431 m), ĉiufoje je 22.45 h laŭ Okcident-Eŭropa Somera Tempo, kiu estas egala al la Mez-Eŭropa Tempo (nederlandanoj aldonu 20 minutojn). Reĝio kaj enondigo de Marc Darnault.

- 7.6. (atentu speciale: mardo, 7.6., kaj, ne, kiel kutime, lundo) „La ŝiĝo Tenacity“, triakta komedio de Charles Vildrac, unua parto. Tradukis Roger Bernard; prezentos R. Bernard.
- 13.6. „La ŝiĝo Tenacity“, dua parto. Tradukis R. Bernard; prezentos N. Epstein.
- 20.6. „Rozalio“ unuakta komedio de M. Maurey (trad. Le Brun); „Nokta ekspedicio“, skeĉo de Tristan Bernard (trad. Rollet de l'Isle; „Profesoro Forgesulo“, rapida skeĉo de E. Julin. Prezentos P. Filiâtre.
- 27.6. „Salome“, unuakta dramo de Oscar Wilde. Tradukis H. J. Bulthuis; prezentos f-ino Cécile Royer.

Aŭskultinte, ne forgesu danki la stacion!

Atentu pri Radio Ljubljana!

La 18.6. je 23.00 - 23.10 laŭ MET kaj Greenwich'a Somera Tempo. Informoj pri la 20-a IKUE-Kongreso, po 5 minutoj en slovena lingvo kaj en Esperanto. Aŭskultinte, danku al: Radio Ljubljana, Jugoslavio.

La plej nova germana sendstacio uzas Esperanton.

La sudetgermana sendstacio Prag II enkondukis laŭ propono de samideano Gahler por siaj provsendoj esperantlingvan anoncadon!

La gravecon de tiu fakto, ke mezeŭropa germana stacio uzas nian lingvon, neniu subtakso kaj kunhelpo sukcesigi la provon. La stacio fiksas la verdlingvan anoncadon sur disko, kaj oni uzos ĝin pli ofte dum la sekvonta tempo. Certan tempon la stacio ne

fiksas. Sed bonvolu kelkfoje aŭskulti vespere la stacion kaj respondi: aŭdinte la alvokon pri raportado de aŭskultebleco kaj distanco de la aŭskultloko. La stacio sendas sur ondo 269.5 m, la pli frua ondo de Moravska Ostrava. B. G.

Programo de Radio Roma 2 RO:

La 6, 13, 20 kaj 27 je 22.00 (ondlongeco 31, 13 m) — prelegoj.

La 11, 18 kaj 25 je 19:01 — 19:18 (ondlongeco 25,4 m) — turismaj kronikoj.

Radio-Aŭskultantoj, atentu!

Radio-Roma eldonos kaj disdonos senpage la monatan programon en Esperanto, se...

Nuntempe E. I. A. R. (Ente Italiano Audizioni Radiofoniche) eldonas kaj disdonas senpage la monatan programon de la radiostacio 2RO (25,4 m kaj 31,13 m) en la lingvoj: itala, angla, franca, germana, hispana kaj portugala.

Por ĉiu el la supraj lingvoj ĝi aperigas ĉiumonate belaspektan broŝuron 24-paĝan kun verda kovrilo en formato 18x12.

Se sufiĉa nombro da radio-aŭskultantoj deziras regule ricevi la Esperanton eldonon, la Direkcio de E. I. A. R. eventuale aperigos la programon ankaŭ en tiu lingvo.

Oni atentigas, ke la radio-stacio 2RO dissendas ĉiusemajne du Esperantajn paroladojn: lunde kaj sabate.

Oni varme petas la esperantistajn organizaĵojn kaj unuopulojn propagandi por ke multaj samideanoj petu la eldonon en nia lingvo per la jena (aŭ simila) teksto: La subskribinto deziras ricevi ĉiumonate la Esperantan eldonon de la programo de 2RO. (Skribu tre klare la adreson)!

Ĉiun korespondadon oni adresu al: E.I.A.R., via Montello, 5 ROMA (Italujo).

FUNEBRA SCIIGO.

En Poznań mortis en aĝo de 45 jaroj profesoro de la tiea universitato **dro Stanisław Nowakowski**. Li estis direktoro de instituto por mastrumada geografio. Dum siaj vojaĝoj li vizitis multajn landojn, interalie Japanujon kaj Usonon. Eble tiuj vojaĝoj kaŭzis, ke li estis simpatiuolo de la lingvo Esperanto. Siatempe li partoprenis landan kongreson de E. en Krakovo kaj estis unu el iniciatintoj de la jubilea kongreso en Warszawa. Nia movado perdis en li gravan amikon. Honoron al lia memoro!

KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

XX-a I. K. U. E. JUBILEA KONGRESO

okazos en Ljubljana la 6-11 de aŭgusto 1938.

Leteradreso: Damjan Vahen, sekretario, Ljubljana, Reslova 29 (Jugoslavio).

AL LANDAJ LIGOJ KAJ E-ORGANIZAĴOJ TUTMONDAJ!

Okaze de la jubilea XX-a IKUE-kongreso en Ljubljana 6-11 VIII 1938, Jugoslavujo, oni intencas aranĝi grandstilan **revuon de naciaj kostumoj**. Tio estus ne nur propagando por Esperanto, tio estus grandioza manifestacio por nia esperanta ideo!

Ĉiuj popoloj sub unu sola tegmento, plej diverslingvanoj tamen komprenas unu la alian!

Cu vi povas imagi la sukceson de tia revuo? Cu ĝi ne montrus plej praktike al ĉiujara plej diversa kongresanaro la praktikan valoron de Esperanto kaj ĝian utilon?

Tial L. K. K. de „Nia XX-a“ turnas sin al yil!

Cu vi povas kaj volas aranĝi unu aŭ pli da grupoj de plej famaj naciaj kostumoj el via lando?

La grupo povas konsisti el diversseksaj homoj (plej bone paroj), kiuj prezentu erojn el popola vivo, kutimoj, dancoj k. t. p. Plej bonvenaj estus grupoj el tri aŭ kvar paroj kun muzikantoj. Tiuj ĉi lastaj muziku je popolaj instrumentoj. Grupo poste povas bele

prezenti dancon de sia popolo (se estus pliaj, dancojn de sia regiono).

La elspezoj por la partopreno ne estas grandaj, tial la aranĝo ne estas malfacila. LKK prizorgos rahaton sur fervojoj, vaporsiplinioj en Jugoslavujo, same estus oportune, se landaj ligoj prizorgus fervojrahaton en siaj ŝtatoj.

Ni turnas nin al vi bonintence: se vi nur povas, zorgu ankaŭ vi, ke tiu momento estu des pli eluzita por propagando de Esperanto!

Se ĉiu landa ligo nur parte faros, kion ĝi fari povas, la sukceso neniel forestos.

Bonvolu tiurilate respondi al nia adreso kieĵ eble plej baldaŭ.

LKK prizorgos por la plej bela kaj originala grupo belan premion, se tiu revuo de naciaj kostumoj estos aranĝota.

Varbu por la kongreso. La kotizo estas tre malalta. Nur Din 50— aŭ egalvaloron ĉiu povas oferi por nia sankta afero!

Atendante tiurilatan vian sciigon, salutas vin via

Damian Vahen, LKK-sekretario.

* * *

Mallongaj informoj.

Donaco de la Papo. Okaze de la memortago de sia kronado, la Sankta Patro donacis al la Biblioteko vatikana tre valoran kodekson sirian. Tiu libroproduko de Kristana siria arto el la 13a jarcento enhavas i. a. ilustraĵojn ĉe la Evangelioj. La dokumento estis skribata en 1220 en monaĥejo ĉe Ninive kaj havas unikan valoron por la pristudado de la tiutempa siria arto.

Nova pola Sanktulo. Granda ĝojo regas en Polujo, ĉar pligrandiĝis la vico de polaj sanktuloj. Dum ĉi-jara pasko, la 17-an de aprilo la Apostola Seĝo sanktuligis polan jezuiton, beatulon Andreon Bobola'n, martiron, kiu sian vivon oferis por la unio.

Vera „solenajo de l'solenajoj“ estis por Polujo la ĉi-jara Pasko. La paskaj halelujokantoj sur la tombo de sankta Petro estis akompanataj la neeraripovan orakolon, per kiu la papo enigis en la nombron de sanktuloj la beatulon Andreon Bobola'n. Tiel diris la kardinalo primato Dr Aŭgusto Hlond, en sia alvoko al la pola katolikaro.

La plej granda katedralo de Polujo. Antaŭ nelonge en Katowice komenciĝis la konstruado de nova katedralo, kiu estos la plej granda de Polujo. Ĝi povos enteni 12.000 personojn. Apud la katedralo aperos aliaj konstruaĵoj, destinitaj por la katolika agado.

Ryszard Chromik.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

UNIVERSALA KONGRESO, BERN, 1939.

Sub la titolo „Svisa Esperanto-Tago“ (Biel, 3 aprilo, 1938) aperis en la n-ro 461 de „Esperanto“ (U. E. A., Geneve, 15 aprilo, 1938, p. 4) artikolo, kiu povas naski konfuzon pri la organizo de l' 31-a Universala Kongreso en Bern 1939. „La kunvenintaro“,

diras la artikolo — „akceptis unuanime proponon, ebligantan garantian por la kunigo de ĉiuj fortoj, kaj postulantan, ke la kongreso de Bern estu organizata de ambaŭ internaciaj Asocioj: de I. E. L. kaj de U. E. A. samrange, kaj ke la membroj de U. E. A. ĝuu la

samajn rajtojn kiel tiuj de I. E. L. " Ni legis kun surprizo tiun aserton, kiu nepre ŝajnas al ni esti eraro. Ni kaj aliaj partoprenintoj, k' ujn ni demandis, ne memoras pri tia decido. En la oficiala protokolo, garantiita per la du subskriboj; de S-ro H. G. Rotach, antaŭa prezidanto de S. E. S., prezidinto de tiu kunveno, — kaj de F-ino L. Meixler, antaŭa sekretario de S. E. S., protokolintino de tiu kunveno, troviĝas pri tia decido absolute neniu mencio.

Fakte, la Estraro de I. E. L. akceptis la inviton, okazigi la Universalan Kongreson en Bern, kun substreko de l'frazo troviĝanta en la oficiala invit-skribo: „akcepti, ke la kongreso estos gvidata ekskluzive de I. E. L. kaj obei la kongres-regularon de I. E. L.“.

Profunde komprenante la necescon de unueco, klareco kaj disciplino en la esperantista movado, ni subskribintoj plene aliĝas al tiu kondiĉo. Oni rimarku, cetere, ke ne estas necese esti I. E. L. - ano por partopreni Universalan Kongreson kaj ke ĉiuj kongresanoj estas samrajtaj. Sed estu unu organizo kaj unu regularo: Unueco estas forto.

La honestecon de l'artikolo „Svisa Esperanto-Tago“ ni neniel pridubas. Sed la situacio estu klara!

W. PERRENOUD, O. WALDER,
(Prezidanto de S. E. S.) (Vic-prezidanto de S. E. S.)
F. SCHMID,
(Antaŭ Vic-prez. de S. E. S.)

LA MEZEŬROPA SITUACIO

politika ĉesigis la aperon de du interesaj gazetoj. Ili estas la UŬE-EHO en Rumanujo kaj la Verda Revuo en Vieno. Nia unua penso kompreneble estis post la aŭdo de tiuj aferoj, ĉu tiu ĉi situacio ne influis iamaniere ankaŭ la situacion de nia plej granda eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto.

Post koncerna informiĝo ni povas kun ĝojo sciigi niajn legantojn, ke Literatura Mondo laboras senmalhelpo ĝis nun kaj ĝiaj gvidantoj trovas absolute neebla tian ŝanĝon en Hungarujo, kiu farus malhelpon al

illa laboro. Sed ankaŭ tion ni povas ĝoje sciigi, ke la eldonejo Literatura Mondo estis malgraŭ ĉiaj siaj esperoj tiom singarda, ke ĝi jam antaŭ jaroj kreis situacion, kiu ebligas daŭrigi la laboron en iu ajn ŝtato de Eŭropo sen iu ajn prokrasto en ia ajn neatendita situacio. La presejoj de Literatura Mondo laboras nun en kvin landoj kaj ĵus farita nova kontrakto kun presejo en Hongkong ebligas eldoni jare 6000 paĝojn da libroj laŭ la ekstremorientaj prezkondiĉoj.

La esperantistaro do ne devas timi la sorton de nia plej aktiva eldonejo. Literatura Mondo povas resti en ĉiu politika turniĝo aktiva kaj laborkapabla kaj tiun aktivecon povas paralizi nur tio, se la esperantistoj, la klientoj de la eldonejo ne sendus la abonojn al la gazetoj de Literatura Mondo kaj ne aĉetus la nove aperintajn interesajn librojn de ĝi. Sed la esperantistaro jam de longe konas la laborojn, kiujn Literatura Mondo kreis por la movado kaj tial ni povas trankvile diri al niaj legantoj: nia „literatura centro“ ne estas en danĝero kaj travivos ĉiujn uraganojn.

Lastmamente ni ricevis sciigon, ke Esperanto ne plu trovas malhelpojn en Rumanujo. La societoj refunkcias post nova legalizo
(La Red.)

GRUPAJ FUNKCIULOJ

aŭ izolite agantoj, kiuj laboras seninterrompe almenaŭ du jarojn por nia movado, devus nepre trovi lokon en la Enciklopedio de Esperanto, por ke ilin la historio ne forgesu. Tio estas la vidpunkto de la redakcio de Enciklopedio kaj pro tio ĝi alvokas ĉiujn, kiuj faris la almenaŭ dujaran laboron, postuli la necesan formularon por la biografiaj indikoj. Tiuj formularoj estas haveblaj de ĉiuj esperantistaj societoj, lokaj delegitoj, kaj libristoj, sed en la okazoj, kiam tiuj ne povas doni, volonte liveras ĝin Literatura Mondo, Budapeŝto IX. Hungarujo, Soroksári ŭt 38. En Nederlando postulu nur de NEC Rotterdam W Schiedamscheweg 209/h kaj en Svedujo nur de SLEA Stokholm, Barnhusgatan 8. en ĈSR prefere ĉe la asocia librejo.

*

*

*

La 9-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

okazos la 4 — 6 an de
junio en Brugge (Belgujo).

La XII-a HUNGARA ESPERANTA- KONGRESO

okazos la 5 — 6 an de
junio en Pécs.

*

*

*

ANGLUJO VOKAS GEJUNULOJN!

Vizitu la Junularan Tendaron.

Dum la semajno post la Universala Kongreso okazos tendaro por esperantistaj gejunuloj (aĝlimo 30 jaroj) ĉe bela tendarkampono apud Ipswich, en orienta Anglujo.

Jen bona ŝanco intimiĝi kun kampara kaj provinca vivo en Anglujo meze de Esperantistoj.

La tendarejo situas en bela kamparo proksime de Ipswich (90.000 loĝantoj) kaj estas disponigita al ni de la Ipswich Rotaria Klubo. Estas bona pavilono kaj naĝbaseno tie, kaj akvokonduka sistemo estas instalita. La tendojn pruntedonas la Ipswich Skoltaro.

La tendaro estas organizita de la B. E. A. en la kadro de la postkongresaj aranĝoj. Kunlaboros la loka Esperanta Grupo kaj Skolta Esperantista Ligo. Ĝi estas partoprenebla de iu ajn esperantista junulo, ĉu kongresano aŭ ne. **La kosto por unu semajno estas £1. 0. 0. Ĉi tio enkalkulas la manĝaĵojn.**

Apartaj, malkaraj ekskursoj estas aranĝataj por laŭdezira partopreno.

Eksterlandanoj — Ipswich estas facile atingebla, estante proksime de Harwich, kaj oni esperas, ke vi multnombre anoncos vin por sukcesigi la tendaron.

Oni anoncu sin al S-ro C. C. Goldsmith, 30-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

VENU MULTNOMBRE!

*

*

*

SOMERRESTADEJO EN BUDAPEŜT.

Ek de la nuna somero ankaŭ Budapeŝt. la „Reĝino de Danubo“, malfermos siajn partodejojn por la tutmonda esperantistaro, ebligante dum du semajnaj kursoj kaj internaciaj konversacioj malkaran somer-restadon, inter la plej agrablaj cirkonstancoj.

Budapeŝt, estante ne nur unu el la plej belaj urboj de Eŭropo, sed ankaŭ la plej granda kaj plej sanigfonto riĉa banurbo de la tuta mondo, ĉiani estis kaj estos por siaj gastoj ne forgesibla travivaĵo.

La mirinde rava ĉirkaŭaĵo, la potencega Danubo, la unike pitoreska panoramo de la nokta Budapeŝto, la ĝentilaj kaj gastamaj enloĝantoj, la belegaj hungarinoj, la ciganmuziko, dum longa-longa tempo restos la plej hela sonĝo, inter la revenantaj belaj sonĝoj de ĉiuj, kiuj havis iam la feliĉon paŝigi kelkajn tagojn en tiu ĉi urbo de belaj, ĉarmoj kaj agrablajoj.

Por doni la okazon al la tutmonda esperantistaro ĝui la ravojn de la somera Budapeŝto, la Országos Baross Gábor Kör de-

LA 25-a JUBILEA KONGRESO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO OKAZOS EN LA PITORESKA VERDA URBO SEVLIEVO, LA 16—18 JULIO.

Sevlievo, situanta proksime de la fama kaj legenda montaro Balkana, estas facile atingebla per aŭtomobilo, ĉar tra ĝi pasas la grava malnova ŝoseo de Sofia al Ruse kaj Varna. Konstante kaj tuttage veturantaj aŭtobusoj ligas Sevlievon kun la proksimaj fervojstacioj.

La sevlievanoj estas gastamaj kaj servemaj, tion ili montris dum la pasintjara turista kongreso en la urbo.

La vivo en Bulgarujo, kaj speciale en Sevlievo, estas tre malmultekosta — por francoj, germanoj, belgoj, k. a. **ridinte malmultekosta.**

Post la kongreso oni aranĝos ekskursojn en la pitoreska Balkano.

Zorge aranĝota **esperanta ekspozicio.**

Helpu nin, ĝesamideanoj et la tuta mondo, por ĝia aranĝo, sendante al ni librojn, gazetojn, ilustritajn poŝtkartojn, fotojn el la esperantista vivo k. a. materialojn, por ke ni brave kaj fiere flirtigu la verdan standardon.

Informojn kaj **ilustritan gvidfolion** pri Sevlievo petu senpage ĉe la delegito de UEA, **S-ro Simeon St. Hesapĉiev**, gimnazia profesoro, **Sevlievo** Bulgarujo.

cidis aranĝi en Budapeŝto „**Internaciajn FERIAJN TAGOJN**“.

Dum tiuj tagoj la partoprenantoj, loĝante en unuaranga pensio pasigos la tagojn inter la plej agrabla variado de lernado, konversacio, promenado, sinbanado, remado kaj ekskurso, de mateno ĝis vespero. Dum la vesperaj kaj noktaj horoj sekvas la ĝuado de ciganmuziko kaj dancado de la plej agrabla internacia societo.

La prezoi estas eksterordinare malaltaj. Vojaĝrabatoj. Interesuloj petu prospekton de la **O. B. G. K. Esperanto Fako, Budapeŝt, Petöfi Sándor u. 9, IV 3** almetante l respondukuponon.

LA INTERNACIAJ FERIAJ ESP.-KURSOJ en Helsingör, Danlando
16—24 de julio kaj 15—25 de aŭgusto 1938.

Denove en la venonta somero okazos la internaciaj feriaj kursoj en la internacia altlernejo el Helsingör. Ke la Esperantistaro tre ŝatas tiujn internaciajn kursojn kun ĝiaj

eminentaj prelegantoj kaj geinstruistoj, kaj ke oni tre ŝatas ferian restadon inter tre multaj diverslandaj samideanoj en tre sincere amika atmosfero kaj en la tre alloga regiono, montras la fakto, ke la internaciaj feriaj kursoj dum 7 jaroj konstante kreakadis laŭ nombro de la partoprenantoj. En la pasinta somero partoprenis 210 personoj en 14 landoj.

De la 16--24 de julio okazos la internacia kursa serio, kiu ampleksas **elementan** (laŭ Cseh-metodo), **daŭrigan** (laŭ konversacia metodo), **perfektigan** kaj **seminariajn** kursojn.

De la 15--25 de aŭgusto okazos la 20-taga internacia ferio Esperantista kun 1--2 prelegoj ĉiutage de plej eminentaj Esp.-prelegistoj. Dum la sama tempo estos ripetata la seminaŭria kurso.

Jenaj personoj prelegos en ambaŭ aranĝoj aŭ en nur unu el ili: F-ino M. Saxl, Berlino; f-ino M. Noll, Kopenhago; s-ro de Waard, Rotterdam; rektoro s-ro Sam Jansson, Stockholm; s-ro Teo Jung, redaktoro de Heroldo; s-ro P. Neergaard, LK'ano, Kopenhago, kaj s-ro L. Friis, Aabyhøj.

Posttagmeze estos aranĝataj diversaj ekskursoj al vidindaj lokoj (ekz. al sveda insulo Hveen kaj al sveda urbo Helsingborg). Vespere estos aranĝataj amuzaj, teatraj, diskutoj, kantado ktp.

La kostoj por partopreni la unuan kursa semajnon (loĝo, manĝo kaj kotizo) estos 48—d. kr. — 1—d. kr. egalvaloras proks.

1'18 pol. zlot. Pro la malalta dana monkurzo la partopreno en unu el la feriaj aranĝoj estos eksterordinare malmultekosta. La manĝoj estas bonegaj kaj ĉambroj belaj.

Ni varme rekomendas al ĉiuj gesamideanoj partopreni, ĉar neforgesebla estos tia ferio en pure Esp-a atmosfero inter multege da diversnaciaj gesamideanoj.

Prospekto senpage havebla ĉe

S-ro L. Friis,
Thyrasvej 15, Aabyhøj, Danlando.

LA UNUA JUNULARSEMAJNO EN NEDERLANDO.

La Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo aranĝos kampsamajnon por infanoj de 12 ĝis 18 jaroj, kiuj kontentige kapablas uzi Esperanton.

La tendaro estos konstruata sur la — en Nederlando — konata kampfereno Doorn-Austerlitz-Maarn, Nederlando.

Sporto, ludoj, promenadoj sur la vasta erikejo kaj arbaroj, kantoj, k. t. p. formas la programon.

La beleco de la ĉirkaŭaĵoj de nia kampfereno speciale allogos partoprenadon en la sendube interesa kaj ĝuiga kampado.

Nederlandaj infanoj pagas fl. 8. — inkluzive la vojaĝkostojn; alilandanoj fl. 3. — sen vojaĝkostoj; do tre malalta sumo.

Anoncu vin baldaŭ al:

k-dino A. C. Obbes, Roetzemlaan 24 b
Rotterdam Noord, Nederlando.

POLLANDA KRONIKO.

LETERO.

De s-ano Ludwik Stalcwski el Biala Podlaska ni ricevis jenan leteron:

Kun ĝojo mi sciigas vin pri la efiko de Esperanta ekspozicio, kiun mi aranĝis en mia urbo en la tagoj de la 3—7 de aprilo k. j.: Sciante bone lokajn cirkonstancojn kaj same malfavorajn tendencojn, mi iomete timis aranĝi la ekspozicion, same mi timis, ke mi ne ridindigu la movadon, do antaŭ ĉio mi ekkomencis kolekton de ekspoziciaĵoj. Mi prizorgis bonan ejon, salonon de LOPP, kaj ke la urbestro ing. A. Walawski konsentis malfermi la ekspozicion. Tiam mi estis trankvila pri efiko kaj mi nur atendis atakojn de kontraŭuloj, kiuj post nelonge ekkomencis piki. Post apero de artikolo pri la ekspozicio en du lokaj gazetoj kaj post dissendo de invitiloj (300) kelkaj homoj penis malhelpi, informante sin ĉe la starosto, ĉu mi havas permeson, poste oni kriis, ke estas skandalo, ke LOPP pruntedonis la salonon

al „pacifistoj komunistaj...“ Fel'ĉe mi antaŭvidante, siatempe sciigis staroston pri mia agado kiel delegito de IEL, same mi ricevis permeson aranĝi la ekspozicion kaj dume kolekton de libervolaj donacoj je celoj de PED („kvin mil fondo“). Kelkajn tagojn antaŭ la malfermo, la tuta urbo ŝajne esperantigis, ĉie estis elpendigitaj afiŝoj pri la okazonta Esperanta ekspozicio. En kelkaj grandaj vendejoj en fenestroj estis elpendigitaj grandaj afiŝoj (menditaj ĉe „Heroldo de Esp.“: verda stelo, blua terglobo kaj surskribo Esperanto, mal supre enpresita la teksto).

La 3-an de aprilo je 13 h en ĉeesto de 50 gastoj, la urbestro malfermis la ekspozicion kortuŝe parolante pri Esperanto, ĝia celo kaj la evoluo. Li aldonis, ke li estas tre favora por nia movado kaj en sia juneco li lernis Esperanton. La paroladon antaŭis salutparolado de la organizinto kaj tragulo de gratuloj, antaŭ ĉio de familio Zamenhof, de gen Bastien, de Teo Jung, de prof. Sygnarski kaj liaj gimnazianoj, same de gim-

nazianoj el Szamotuly kaj de multaj samideanoj, interalie de Esperanto Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko, subskribita de Dro prof. Kamaryt, parte pole kaj esperante. La Ekspozicion vizitis 350 personoj, pliparte gelnantoj (la memorlibron enskribigis 272 p.) Mi prezentis jenajn fakojn: Katolikismo kaj Esperanto, radio-Esperanto, turismo, internaciaj foiroj kaj ekspozicioj, literaturo, specialan angulon mi dediĉis al ora jubileo de Esperanto, gazetaro (parte speciale polaj gazetoj pri Esperanto (I. K. C.) kaj esperantaj pri Polujo (Literatura Mondo kaj Heroldo de Esp.) k. a.

Dum la ekspozicio mi enmetis ŝparmonujon kaj kiel libervolajn donacojn je celoj de

PED („Kvinmil-fondo“) kaj mi kolektis 9.— zl, kiujn mi forsendis al PED.

La ekspozicio estis multnombre vizitata (malbona vetero, ĉi tie socio estas tre malagema). Multaj homoj ekinteresiĝis pri la afero, 32 personoj turnis sin al mi kun peto organizi la kurson. Kelkaj homoj jam komencis studi la lingvon aĉetante lernolibrojn, interalie kelkaj vere seriozaj homoj, kaj fine ĝi faris sian taskon kiel propaganda Ekspozicio.

Samtempe al ĉiuj samideanoj, kiuj sendis gratulojn kaj ekspoziciaĵojn por la okazinta Esperanta ekspozicio en Biała Podlaska, mi elkore dankas.

L. Stalewski, delegito IEL.

* * *

LUBLIN. La Esperanta Sekcio ĉe „Kultur-Liga“ laboras entuziasme. La kursfinon oni ligis kun la letervespero: alvenis 39 leteroj el 16 landoj, kio fariĝis bona propagando inter la vizitantoj. La 9 V kj. komencis s-ano A. Sanik daŭrigan kurson por 22 personoj; baldaŭ komenciĝos ankaŭ nova, malsupera kurso, kun propaganda vespero. Deĵoroj ĉiuvespere, konversacioj 3-foje en semajno. Travojaĝantoj kaj samcelanoj estas kore bonvenataj (adreso: Rybna 1.).

WARSAWA. Varsovia Esperantista Societo (Leszno 56/9) apartenas al la esperantaj societoj, kiuj laboras sisteme, vigle, sen superflua deklamado aŭ fanfaronado. Ĝus la societo komencis agadon por instigi la „Polan Radion“ disaŭdigi en kaj pri Esperanto. Tiu-ĉe estas presitaj specialaj folioj, enhavantaj lokon por 20 subskriboj de radioabonantoj, postulantaj enkondukon de Esperanto. La foliojn Varsovia Esper. Societo dissendas al esperantaj societoj kaj unuopaj samideanoj en Polujo. Societoj kaj personoj, kiuj ne ricevis la foliojn, estas petataj postuli ilin de la Societo. Plenigitajn foliojn oni devas sendi al la societo kiel eble plej rapide (ĝis 20-a de junio). Post kiam la nombro de kolektitaj subskriboj estos sufiĉe granda kaj impona, Vars. Esper. Societo prezentos la foliojn kun konforma petskribo al Direkcio de la „Pola Radio“.

La societo presigis 10.000 libroenmetilojn kun propaganda teksto, kiuj estas disdonataj en multaj bibliotekoj de la urbo.

La societo presigis ankaŭ 1 000 cirkulerojn pri Esperanto, kiuj estas dissendataj al diversaj organizaĵoj kaj societoj.

Ĉe Vars. Esper. Societo konstante funkcias kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

Ĉiumarde okazas klubaj vesperoj kun diversaj referaĵoj en Esperanto. Biblioteko posedas ĉ. 600 vol. La societo funkcias lunde,

marde, ĵaŭde kaj vendrede h. 20 ĝis 22. Varsoviaj kaj eksterlandaj samideanoj estas petataj viziti ĝin.

En la grava ĉiutaga gazeto „Nasz Przegląd“ aperis granda artikolo pri Julio Baghy, verkita de s-no J. Dratwer.

WILNO. Antaŭ kelkaj semajnoj la Vilna Esperantista Societo „Universo“ okazigis sian ĝeneralan jarkunvenon. La estraro prezentis al la esperantistaro raporton pri sia tutjara laboro, nome: dum la tuta laborjaro „Universo“ gvidis sukcesplene kelkajn elementajn kursojn, superan kurson, literaturan rondon, knrson de stenografio (la tri lastaj subgvidado de D-ro A. Gurwicz); ankaŭ arangis esperantan akademion kaj agadis por nomigo de unu el la vilnaj stratoj je la nomo de D-ro L. L. Zamenhof (per speciala memorando subskribita de vilnaj eminentuloj-esperantistoj, privata aŭdienco ĉe la vicprezidanto de la urbo kaj ĉe la urbkonsilantoj), dume bedaŭrinde sen sukceso.

Dum la Jubilea Kongreso en Varsovio okazis konferenco de ĉiuj ĉeestantaj judaj esperantistoj, kiu estis kunvokita de „Universo“.

La forirantan estraron anstataŭis la novelektita, konsistanta el jenaj personoj: Dro D. Fajnštejn, prezidanto; S-ro M. Perelman, Dro A. Gurwicz, vicprezidanto; S-ro L. Suĥotnik, sekretario; S-ro B. Zalmanson, kasiso; Dro A. Goldburt, S-ro K. Geršater, S-ro Z. Szyk, komitatanoj; F-ino R. Porozowska, F-ino Ch. Łapido, anst. de komitatanoj. Revizia komisiono: S-ro M. Lifszyc, S-ro F. Alperowicz, S-ro M. Rubinowicz.

La nova estraro decidis kaj komencis plivigli la movadon en Vilno. Tiu-ĉe oni penas favorigi la lokan gazetaron al Esperanto kaj okazigi ĉiujn 2 semajnojn esperantlingvajn prelegojn (deviga takso de ĉiu komitatano), ankaŭ varbi novajn membrojn.

La 13-an de majo 1938 nia est. prezidanto

Dro D. FajNSTEJN faris prelegon en la societo je la temo „El la sfero de fantazio“. En tiu ĉi 1½ hora prelego Dro FajNSTAJN raportis pri lia verko „La fantaziaj monstroj en kredoj kaj mitologio“, kiu nun estas eldonita de la „Societo de Sciencamikoj“ en Vilno pollingve kun germanlingva resumo. La preleginto detale pritraktis mitologiajn monstrojn troveblajn en la tradicio, kredoj, fabeloj kaj

arto de diversaj civilizitaj kaj necivilizitaj popoloj, ilian konstruon kaj devenon. La prelego estis vere interesplene aŭskultata de la ĉeestantaj samideanoj, tiom pli, ke ĝia malfacila por la vastaj rondoj enhavo estis prezentata en tre facila lingvo, agrable kaj belstila. Tiu ĉi prelego ankoraŭ unufoje pruvis la taŭgecon de nia lingvo al ĉiuj branĉoj de la scienco.

GRAVA AVIZO!

Reprezentanto de la dumonata, 24-paĝa, ilustrita „SCIENCA GAZETO“ estas por Polujo la administracio de Pola Esperantisto. Abonprezo jara (por Polujo malaltigita) 4 zł, pagata je konto de „Pola Esperantisto“, konto P. K. O. Nr. 406.660. Abonante nun, vi ricevas ĉiujn numerojn de post januaro k. j. Ĉiu klera homo, por kiu ne estas indiferentaj la plej novaj sciencaj temoj — devas nepre aboni la revuon!

Ĉe pagoj rimarkigu ĉiam la celon!

BONEGA PROPAGANDILO!

Brazilaj poŝtmarkoj kun esp. teksto de IX Intern. Specimena Foiro kaj IX Brazila Kongr. de Esperanto haveblaj ĉe admin. de „Pola Esperantisto“ po 20 gr por peco. Aldonu 25 gr por poŝtelspezoj. Ni akceptas ankaŭ neuzitajn poŝtmarkojn kiel pagon.

PER UNUIGITAJ FORTOJ

objektive kaj malkaŝe informas pri la okazintaĵoj kaj la problemoj de la movado; per serioza kritiko - kaj ankaŭ per primoko-kontraŭbatalas erarigan malutilan blufadon; batalas por renovigo de kreema spirito, de pasia entuziasmo;

klopodas servi ĉiujn partojn, ĉiujn ĉelojn de la movado, sendepende de politika, socia aŭ alia tendencoj;

penadas malkovri la kaŝitajn kaj dissemi-tajn fortojn de la movado kaj unuigi ilin por efektive fruktodona laboro.

SENDEPENDA EKSTERORGANIZA. PER UNUIGITAJ FORTOJ

ĝenerala revuo de la Esperanto - Movado
PARIS-VANVES, 84, rue Jullien
Francujo).

ĉefredaktoro: M. MOVÓ.

Abonejo por Pollando: F-ino Halina Weinstein, Warszawa, Leszno 99, P. K. O. nr 27.867, jarabono 7 zł.

ABONO: jare zł 8.—, duonjare zł 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6.—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0.70, duobla zł 1.40.

ANONCOJ: ½ paĝo zł 30.—, ¼ paĝo zł 15.—, ⅛ paĝo zł 10.—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 8.—, półrocznie zł 4.—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6.—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0.70, podwójny zł 1.40.

OGŁOSZENIA: ½ strony zł 30.—, ¼ strony zł 15.—, ⅛ strony zł 10.—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1.—.

Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.660.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.